

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond pri la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.

La 5-an kaj 19-an de decembro mi jam prelegis pri tiu temo. Dum kelkaj monatoj ĉiudusemajne mi prenos tiun temon, kiu certe interesas la esperantistojn pro multaj kialoj. Multaj el ili havas infanojn, kaj sin demandas, ĉu estas bone aŭ danĝere instrui al ili la internacian lingvon. Multaj devas malfermi esperanto-kurson en faka grupo, kaj tio sen pedagogiaj informoj. Kelkaj eĉ provas malfermi kurson en publika lernejo. Kelkaj estas instruistoj, kiuj povus instrui esperanton en sia lernejo, sed tion ne kuraĝas pro malbona eksperimento de kolego. Por vi ĉiuj mi tuŝos plej diversajn temojn. Se miaj prelegoj vin interesas, skribu al mi pere de la radio, rakontu viajn eksperimentojn, kritiku miajn dirojn, proponu imitindaĵojn. Se miaj prelegoj vin enuigas, skribu tamen al mi por tion diri kaj proponu aliajn temojn.

La strukturo de la penso ne estas la sama ĉe ĉiuj. Dum proksimume triono de la homoj estas analizemaj, alia triono vidas la fenomenojn tutece, alia triono uzas ambaŭ pensmanierojn. Mi volas provi montri al vi hodiaŭ, ke tiu konstato permesas kompreni, kial infanoj facile lernas kun iuj instruantoj, dum kun aliaj ili eĉ ŝajnas malprogresi.

Ni unue rigardu klason de sesjaraj geknaboj, kiuj lernas legi kaj skribi. Ni povas fari du testojn kun tiuj infanoj. Unue ni instruos al ili kanton aŭ ludon, kiu havas simplajn frazojn. Ni prenu tiun ĉi :

dek boteloj pendas de la mur'
dek boteloj pendas de la mur'
sed se akcidente falas unu nur
tiam naŭ boteloj pendas de la mur'
naŭ boteloj pendas de la mur'

...

Ni ludos tiun kanton ĝis kiam la tuta klaso kun plezuro ĝin scios. Por tiu ludo ni uzos dek botelojn, kiujn ni faligos unu post la aliaj. La infanoj trovas grandan plezuron en tio !

Kiam la kanto estos parkerigita, tiam ni montros al la infanoj sur longaj paperoj ĝiajn versojn. Dek, naŭ, ok, estas skribitaj per ciferoj. Tiuj infanoj, kiuj ne ankoraŭ scias legi, provas sekvi la tekston per bastoneto dum ni ĝin kantas. Se ili eraras, ni ĉesas la kanton. Ni ĝin rekomencas ĝis kiam unu lernanto kapablas montri la tekston senerare. Post tiu eksperimento ni demandas al tiuj infanoj montri la frazon « dek boteloj pendas de la mur' » aŭ « sed akcidente falas unu nur », kaj ni notas, kiu kapablas tion fari senerare.

En dua eksperimento ni instruos al ili kelkajn literojn kaj pere de ili ni provos konstrui vortojn. Kun la literoj T kaj O ni povas jam konstrui TOTO kaj OTO, poste ni lernas E kaj povas aldoni TEO, poste R por konstrui TRO, TRE, ktp... Se ni aranĝas tiun lecionon sub formo de konkurso, ni konstatos, ke la gajnantoj ne estas la samaj, kiel por la unua konkurso. Multaj infanoj konfuziĝos, ĉar ili ne kapablos rekoni TRE de TRO, TOTO de OTO dum antaŭe ili tre facile povis montri la bonan frazon. Aliaj, kiuj antaŭe ne kapablis distingi tiujn longajn frazojn, havos plezuron en tiu dua ludo. Tiuj lastaj emas analizi. Se oni uzas instrumentodon, kiu iras de la literoj por formi vortojn, kaj de vortoj por formi frazojn, ili tre rapide povos legi. Sed la kamaradoj, kiuj ne estas analizemuloj, penos kaj ŝajnos malpli inteligentaj. Sed ni uzu kontraŭan instrumentodon, kiu unue baziĝas sur la frazoj kaj vortoj, kiujn ni iom post iom provas rekoni. Kion ni rimarkos ? La analizemuloj ne progresas tiel rapide, kiel multaj aliaj kamaradoj, ili ŝajnas malpli inteligentaj.

Kiel mi montros en venonta prelego, oni ne povas kontraŭstari la pensstrukturon de la gelernantoj, oni devas adapti sian instruadon al ĝi. La danĝero de instrumetodo estas, ke ĝi ofte nur konvenas al unu grupo da gelernantoj : vi konas la aboco-librojn, kiuj instruas la legadon ekde la literoj. Vi ankaŭ scias, ke estas instruistoj, kiuj misfamigis tiujn librojn kaj laŭdegas la rezultojn de kontraŭa metodo tuteca, kiu iom tro forgesas instrui la nomojn de la literoj. Ambaŭ metodoj havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Sed ambaŭ ne konvenas al grupo da gelernantoj. Kiam en klaso instruistino ŝanĝas, oni ofte rimarkas mirindajn ŝanĝojn en la kapabloj de la gelernantoj, kiuj lernas legi, jen pruvo, ke la instruado baziĝas sur kontraŭaj rimedoj.

Ĉiu bona pedagogo restas sur meza vojo. Li praktikas ambaŭ metodojn, eĉ se dum sia junaĝo li nur lernis per unu sola metodo, kaj eĉ se lia inspektoro aŭ instruprogramo permesas nur unu metodon. Tiu rimarko valoras ne nur por la instruado de la legado, sed por ĉiu instruado, kaj ĉefe por la lingvo-instruado.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond, la prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, pri la instruado de la fremdaj lingvoj en la lernejoj.

-oOo-